# Informilo

19-03-1992

Monata revuo de la estraro de FEL - 12a j. n-ro 2, mar. 1992

Estraro *Prezidanto:* Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem. Tlf. (03) 440 30 92.

*Instruado:* Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem. Tlf. (03) 239 21 69.

*Financoj:* Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge. Tlf. (050) 33 00 04.

*Sekretario:* Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen. Tlf. (011) 52 19 43.

*Membroj:* Jean Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk. Tlf. (056) 20 07 96.

Peter Berx, Klein Koosterstraat 17, 3570 Alken. Tlf. (011) 31 26 20.
Jan Bovendeerd, Meidoorn 42/2, 2640 Mortsel. Tlf. (03) 449 50 06.

Komisiitoj

*Financoj:* Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.

*Eldona agado:* William Auld, Gerrit Berveling, Chris Declerck, Rejna de Jong, Alex Humet kaj Paul Peeraerts.

*Manlibro de la aktivulo:* Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3001 Heverlee. Tlf. (016) 20 14 53.

*Gazetara servo:* Guido van Damme, p/a FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Tlf. (03) 234 34 00.

*Rebata servo:* Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, 8400 Oostende. Tlf. (059) 70 87 00.

*Prelegvojaĝoj:* Hilde van Ingelgem, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst. Tlf. (053) 70 50 11.

# FEL-estraro: protokolo

21a de februaro 1992

## 1 Financo kaj planado

**Ĉeestas:** Ivo Durwael, Roland Rotsaert, Jos Vandebergh, Paul Peeraerts. La jaro 1991 finiĝas per malgranda pozitiva cifero. Kiel raportite jam en la pasinta numero de *Informilo*, estas kreitaj du rezervoj, unu rezervo por domriparado kaj unu por investado en maŝinoj. La centro debetis tiujn sumojn al riparoj 1991 kaj kreditis ilin al rezervoj. RR demandas sin ĉu tiu estas la ĝusta proceduro. PP informpetos ĉe la revizoro.

## 2 Pleno

**Ĉeestas:** Ivo Durwael, Roland Rotsaert, Jos Vandebergh, Paul Peeraerts, Jean Pierre Allewaert, Alex Humet kaj parttempe la civilservanto Geert Vanhecke.

### 2.1 Nova protokolanto

PP ĉesas esti protokolanto pro troa ŝarĝiteco. JPA transprenas lian taskon ekde nun.

### 2.2 Antaŭa protokolo

Neniuj rimarkoj.





### 2.3 Civilservanto

Ekde la 3a de februaro laboras ĉe FEL Geert Vanhecke, civilservanto. Li i.a. kompilos liston de materialo bezonata por ekspozicioj kaj faros skatolon.

### 2.4 Kop of Flet

GV prenis la iniciaton skribi al BRTN 2, al radioprogramo de Michel Follet. Dimanĉe la 8an de marto li dediĉos babilprogramon pri Esperanto. Temos pri la historio kaj nuna stato de Esperanto. La aŭskultantaro povos interveni telefone dum la elsendo. PP proponas kiel specialan gaston Emile Van Damme[1] kaj kiel telefone-intervjuoton Jo Haazen.

### 2.5 Lingvoborso

Okazos surŝipa lingvoborso "De Babelboot", kiu haltos en Lieĝo, Hasselt, Antverpeno kaj Bruselo. Tre lastminute oni petis ĉu FEL pretas partopreni. Sen eblo konsulti la aliajn estrararojn, ID kaj PP decidis jese respondi. GV deĵoros dum la tri tagoj en kiu la ŝipo estas en Antwerpen kaj Hasselt. Surloka helpanto estas bonvena.

### 2.6 *Service Civil International*

El la kontaktoj, kiujn AH havis kun tiu organizaĵo, montriĝas la preteco plu kunlabori kun FEL. Oni serĉas kamparanan domon. La aranĝo sin direktas al flandroj kaj valonoj. La datoj jam fiksiĝis kaj estos 23a - 30a de aŭgusto. Oni kalkulas je subvencioj de la "Fondaĵo Reĝo Baldueno".

### 2.7 FEL-vojaĝo al UK

Nun 12 personoj aliĝis. Tria aŭtobuseto verŝajne mendiĝos, kvankam tria buseto povas kaŭzi malgajnon se du personoj malmendas. Ekzistas do ankoraŭ iom da hezitemo kontrakti pri tria.

[1] Montriĝas ke BRT rifuzas lian kandidatecon kaj kontraŭproponis pli 'neŭtralan' personon.

## 2.8 Propono Vandemeulebroucke

Tiu ĉi eŭroparlementano el Oostende (Ĉielark-frakcio) dissendas iom vaste karteton pri diversaj manĝaĵoj en 6 lingvoj. Li aldonas folion kun Esperanto-traduko kaj petas ĉu FEL povus dissendi plurajn. FEL povus fari tion, se Esperanto troviĝus sur la karteto mem. Dissendi la karton kun aparta granda folio ŝajnas esti sensenca. GV skribos al sinjoro Vandenmeulebrocke kaj ofertos kunlaboron.

## 2.9 Imago pri FEL

Venis fasko da 'imagoj'. Kiel decidite jam antaŭe, ili aperos en tiu ĉi numero de *Informilo*

## 2.10 Taskoj por GV

Kiel provizorajn taskojn por GV oni notas: 1. eksteraj rilatoj — 2. varbado por *Monato* — 3. korespondado.

## 2.11 Estrarelektoj

AH opinias, ke ID ne plu emas al nova prezidanteco. Li petas al JV anstataŭi lin, sed JV dubas pri siaj kapabloj. ID iĝu komisiito pri la domo. AH proponas starigi reton de provincaj respondeculoj kaj revas pri kunvenoj je provinca nivelo, kun regulaj kunvenoj ĉiujn 3 monatojn. La 23an de februaro okazos tia kunveno en Oostende kune kun la grupoj de Brugge kaj Kortrijk.

## 2.12 Diversaĵoj

FEL ricevis leteron de membro de Pakistana Esperanto-Asocio, Ata Mohammad, kiu volas fari prelegvojaĝon tra Flandrio. AH esploros kaj respondos.

Protokolis JPA.



Estis tute ne eble sendi al vi ĉiujn kompletajn imagojn, do kion mi faris:

Mi kiel eble plej akurate elektis el la jam senditaj imagoj tiujn frazojn kaj teksterojn kiuj plej bone resumas la intencon de la verkinto. En la ĉi-supra slipo vi mencias do literon kaj numeron laŭ via prefero. (ekz. A5)

Multan legplezuron kaj sukceson!

**A. ŝirite el la imago de Paul Peeraerts**

1. ...Joĉjo sukcesas ĉiusemajne aperigi almenaŭ unu artikolon pri esperanto en la gazetaro...
2. ...oni celebras la dekmilan leganton de la revuo 'SEMAJNO' (antaŭa MONATO), pri kiu Paul teknike redaktoras plentempe...
3. ...informa servo disponas pri dudek diversaj broŝuroj pri same multaj facetoj de la internacia lingvo...
4. ...Multe jam funkcias perkomputile, vi konscios kiam vi aŭdas pri la kursoj, PIV-oj, ktp haveblaj surdiskete...
5. ...FEL havos 3 civilservantojn anstataŭ unu...
6. ...FEL estos ligata kun Londona filio per komputilo rekte konsultebla...
7. ...FEL nu plu bezonos aŭ havos tempon por preslaboroj de eksteruloj, ĉar presmaŝinoj, arigmaŝinoj jam konstante zumas...
8. ...Guido kaj Hugo estos FEL-dungitoj (do ne plu DAC-uloj) kiuj ĉefe okupiĝos pri la diversaj revuoj, afiŝoj, ekspozicioj, ktp...
9. ...Novaj DAC-uloj ne plu laboros en la Centro, sed en la lokaj grupoj Brabanta kaj Limburga kaj ... Esperanto-federacioj...

**B. Trancite el la imago de E. Symoens**

1. ...se iam Esperanto estus ĝenerale uzita kaj agnoskita, la Esperanto-asocioj daŭre funkcios kaj ludos rolon, eĉ pli ol nuntempe, por prizorgi la regulan praktikan uzadon de la lingvo, ĉar malmultaj "ordinaraj" homoj vere bezonas ĉiutage internacian lingvon...

2. ...la varb- kaj reklam-taskoj kompreneble forfalus, sed la grava tasko ĉiam restus kaj kreskus: konsistigi la flandran parton de la internacia intergenta mozaiko, ĉar lingvo ne ekzistas kaj certe ne funkcias ekster la homa komunumo...

3. ...demonstri al la flandra komunumo en plej variaj formoj ke ekkreskas translima interna unueco, vere revolucia kaj grandioza perspektivo, tio estas grava tasko de FEL...

**C. Tondite el la imago de R. Wylleman**

1. ...la estonteco de FEL estas la junularo, do konvinki ilin kaj iliajn gepatrojn, geinstruistojn kaj pere de ili la respondeculojn pri instruado, estas farenda. NE per "Esperanto kiel ununura oficiala internacia lingvo", SED JES per "internaciaj kontaktoj inter junuloj"...

2. ...ekzemple la usona poŝtkart-agado MONDO RONDO de "infanoj ĉirkaŭ la mondo"...

3. ...la plej granda malfacilaĵo: ĉu ni havas sufiĉe da kapablaj Esperanto-instruant(ist)oj? kaj kiel oni motivos ilin? Per sindikataj gazetoj, per propedeŭta valoro, per agado en porinstruistaj lernejoj, interŝanĝoj inter lernejoj per Esperanto...

4. ...en 1996 FEL disponos pri adresaro pri politikistoj, ĵurnalistoj kaj aliaj interesitaj de lingvaj komunidkadproblemoj...

5. ...ankaŭ pri memorando favora al Esperanto uzenda dum antaŭbalotaj periodoj ĉe ĉiuj niveloj (vilaĝa ĝis eŭropa)...

6. ...sisteme sendi salutvortojn de FEL al gravaj vizitantoj en nia lando, aldonante kelkajn vortojn/frazojn favore al Esperanto...

7. ...ankaŭ en 1996 okazos valortaksa kunveno pri la laborgrup(et)oj fonditaj en 1992 pri verkado, pri agado eduka kaj servoj...

**D. En la imago de A. Humet troveblas**



1. ...la estonteco de FEL baziĝas sur 1 BONA INFORMADO (al kiu kaj kion (eksteruloj, anoj, aktivuloj/ pli bona informiĝo: informbanko)), 2 BONA INSTRUADO (kursoj kaj formado de intruistoj), 3 INSTIGA UZADO (al tutmondaj kontaktoj (urbovizitoj, UK, seminarioj, korespondado) kaj 4 STARIGO DE FIRMAJ RILATOJ KUN ALIAJ ASOCIOJ kiuj ankaŭ kontribuas al la kreskigo de mondana konscienco (informsesioj, seminarioj kaj efektiva helpo)...

**E. J. Bovendeerd komencas sian imagon per vortoj de Lapenna**

1. ...klopodi instrui Esperanton en medio neinformita verŝajne ne donos rezulton, lernado de Esperanto kiel celo en si mem apenaŭ havas sencon, instruado de la lingvo sen ebleco de praktika aplikado, ne garantios progreson...

kaj li aldonas mem

2. ...Ekspozicioj ne havas sukceson se ili ne estas tuj sekvataj de kurso, kursoj sen samtempa kreado de praktikebleco restas sensukcesaj, JEN do la granda signifo kaj nepra neceso de aktiva grupa vivo, jen la defio de la grupaj respondeculoj...

3. ...la kontentigo de la kliento donos la plej bonan reklamon, nome buŝ-al-orela...

4. ...Gravas do klopodi krei agrablan etoson en agrabla kunvenejo...

5. ...ni ne babilu, sed agu...

**F. G. Pirlot revas en sia imago pri**

1. ...Esperanto-grupoj kiuj kunlaborus, en kiuj la aktivuloj regule kadre de informrondo 1 arigus interesajn informojn kaj diskonigus ilin pere de la informronda reto, 2 al siaj samgrupanoj kaj 3 al gazetaro (samtempe instiginte samgrupanojn reaĝi al aperitaj artikoloj)...

2. ...Esperanto-grupoj kiuj konsiderus Esperanton ne plu kiel nuran agrablan klubaĵon, sed kiel normalan lingvon por internaciaj rilatoj (fakaj, profesiaj, komercaj,...)...

3. ...ĝenerala malfermiĝo de Esperantujo...

**G. La imago de G. Vanhecke substrekas ĝuste tion kiel plej gravan rolon de FEL**

1. ...Esperantujo estas fermita mondo, kaj FEL devus trarompi ĝiajn limojn...

**H. Kaj P. Vets imagas**

1. ...ke FEL (kaj tio estas ĉiu esperantisto en Flandrio) pli profesiiĝos kaj ekuzos pli kaj pli da ideoj kaj teknikoj el la merkatumada scienco...

2. ...ke la kreskanta nombro da aktivuloj sisteme kaj strategie prilaboros celgrupojn...

3. ...ke ĉiu Flandro esperantista metus siajn atingindaĵojn, dezirojn, volojn por FEL surpaperen...

Kaj jen rigardu, ĝis ĉi-tie lia imago veriĝas, sed li volas pli

4. ...ke oni tiel venas al misio en kio estas la grandaj streboj por la venontaj jaroj...

5. ...ke tiel ĉiuj flandraj esperantistoj venas al komunaj strategiaj celoj kune kaj kunlabore fiksitaj per ciferoj, mezureblaj donitaĵoj, datoj, homoj, budĝetoj kaj respondecoj...

6. ...ke tiam ke oni scias pri kio oni volas sukcesi, oni ellaboras komunan merkatuman planon...

7. ...ke post iom da tempo ekkreskas sento de solidareco, samideaneco kaj kunlaboremo, ke ekestas KULTURO de samstrategio al komuna celo...

8. ...ke tiu labormetodo kreas novan energion kaj sukcesojn tiel ke je la jaro 1996 FEL staros en la gazetaro apud GREENPEACE, AMNESTIO INTERNACIA, OXFAM, ktp...

**I. S-ro Jacobs havas imagon pri**

1. ...ellaboro de Esperanto-turismo kiel alternativa turismo kun taŭga strukturo kaj kvalifikitaj oficistoj...

2. ...emerituloj kaj studentoj estas konsiderataj kiel ĉionfarantaj servistinoj...



3. ...renkontiĝoj kun kaj por eksterlandanoj estas taŭga okazo por pruvi la utilon de Esperanto...

4. ...arigi tiujn homojn kiuj havas la samajn ŝatokupojn, ne nur pro ilia tuja ĝojo, sed por starigi, plifortigi kaj pligrandigi lokajn naciajn kaj fakajn rondojn, kaj tio specife gravas por kantado...

5. ...aranĝo de ĉiujaraj okazontaĵoj (skisemajnfino, boatado sur la Lesse, urbovizitoj, ktp.), kune kun la Valonoj pro tri avantaĝoj de praktiko en malgrandaj grupoj, de tuja pozitiva rezulto por la movado kaj de la tuja efiko ĉe la apude ĉeestanta ne-esperantista publiko, eble oni enkonduku poentsistemon...

6. ...strategio havus tri grandajn laborkampojn, laŭvice unue instruado (ĉar televido allogas pli ol volontulaj vesperkursoj), Esperanto devas esti enkondukita en la instrusistemo. tion-ĉi esploru fakuloj, prefere grupo da instruantoj, aliflanke necesas anticipaj kontaktoj kun politikistoj (premgrupo)

7. due la movado devas plibonigi sian funkciadon, administradon kaj estraron, estu klaraj la laborkampoj kaj kompetencoj kaj anstataŭ nura ĝenerala kunveno okazu vera kongreso kiu temos pri la venontjara agado kaj kiun la diversaj lokaj grupoj preparas kun ĉiuj klubanoj. Tio ege gravas se ni volas allogi alternativulojn kiuj ne akceptas la establitan socion kaj volas malkoncentrigitan potencon

8. trie kluboj ne estus celo sed vere necesaj iloj kiuj arigos homojn en kiuj naskiĝas aktiveco, do gravas ke la grupo ne nur teorie vivetas, sed devas esti flegata ekz. de nacia instanco, laborgrupo, fakulo, respondeculo kiu diplomate kontrolu, sekvu, helpu ĝin...

**J. S-ro Vanden Bempt vizias FEL-on en 1996 tiel**

1. ...FEL ne multe ŝanĝiĝos inter 1992 kaj 1996, ĉar ĝin portas volontuloj kiuj ne volos akcepti en sia laboro unuecan strategion kaj taktikon, nur eble se ilin direktas forta personeco...

2. ...strategio direktas sin al konsciigo pri la bezono de Esperanto, per fortigo de la rilato inter produkto (Esperanto) kaj bezono. Tial oni esploros kaj prezentos la nunajn utilojn kiel unikajn por Esperanto. Esploro montros ke la utiloj troviĝas tie kie aliaj lingvoj intervenas (traduka servo en kunlaboro kun UEA-deligitaro, libroklubo por alilingvaj libroj,

vojaĝagentejo kunlabore kun pasporta servo, monda turismo, Grésillon, vendejo de mapoj kaj vojaĝlibroj, lingvolernejo kiu sin direktas al minoritataj lingvoj, lingvaj staĝoj, kaj el sabata kreiva pensado venos listo de pli ol cent ideoj...

3. ...por financi tion, oni kreu kompanion, kies ekonomia laboro estus aparta de la movada. Situacio jam ekzistanta (la grafika fako de FEL), sed nun pli profundigita. Oni trovas kontentigajn solvojn por juraj kaj ekonomiaj aspektoj, oni nun rajtas reklami, ktp. kaj iom post iom la kompanio estos profitdona, tiel ke ĝi povas subvencii la movadan aktivecon...

4. ...Post kiam la grafika fako de FEL ekprofitdonas, ekestas bona momento por dua aktiveco, ekz. lingvolernejo (instrui la nederlandan al la jam enfluantaj orient-Eŭropanoj), kaj tria aktiveco sekvas tuj (inter tiuj orient-eŭropanoj troviĝos bonaj instruantoj de ekz. slavaj lingvoj por satigi la bezonon de flandraj kompanioj en Orient-Eŭropo. Finance ni ne tuj kalkulas je ŝtata subvencio (la lernejo ne estos tuj rekonata), sed ni havas altkvalitan kurson kun servoj (koresponda servo, pasporta servo, ktp)... La celo de ĉio-ĉi estos ke ekonomia aktiveco, sed se la kursanoj tiom miras ke ili ankaŭ lernas Esperanton tio estos pozitiva efiko...

5. ...Oni profesiecigas ĉion per agadplanoj, kiuj enhavu la celon de la agado, ĝian priskribon kaj limigojn, kritikajn sukcesfaktorojn, respondeculon kaj projektteamon, labortakson kaj datojn kaj precipe K/P-analizon kaj objektivan prioritatdifinon...

6. ...En la okuloj de la volontuloj la komerciĝo fariĝas akceptebla pro la apartigo de movado kaj ekonomiaj aktivecoj...

7. ...pluraj volontuloj kunigos en si la movadan kaj la ekonomian agadon. La diseco de la volontuloj fariĝos avantaĝo: alportado de laboro por la grafika fako kaj la lingvolernejo, ktp...

8. Pertelefona instruservo je vespera favortarifo eblos danke al la disaj volontuloj, kiuj nun ankaŭ povus varbi en sia ĉirkaŭaĵo...

9. ...tiel restas la ekonomiaj aktivecoj precipe direktitaj al la ne-esperanta publiko, sed evidentiĝas al multaj la avantaĝoj kaj eblecoj de la internacia lingvo...



**K. Petro De Smedt vidas la FEL-an estontecon tiel:**

1. ...rolo de gvidanto (estrarano, prezidanto,...) ĝuste konsistas el instigado, li devas antaŭ ĉio esti kapabla laborigi la membrojn...

2. ...Ĉiuj sundube havas imagon, esperojn, planojn, ideojn, sed jam unuevice oni centre devas esplori aĝojn kaj aliajn donitaĵojn, statistikojn... kie estas la junularo?...

3. ...ni bezonas kapablajn laboremajn homojn kaj sufiĉe da mono, kaj precipe tiu lasta estas grava, ĉar per ĝi aĉeteblas la alia...

4. ...Bezonata en FEL estas iom da glasnosto kaj da perestrojko, do oni finu la kaŝemon pri la financa kaj aliaj situacioj kaj laboru ankaraŭ pli profesiece...

5. ...Respondeculo sin dediĉu al la disvastigo de MONATO, la prestiĝa revuo kun pli ol 20.000 abonantoj kaj sur normala (t.e. ne reuza) papero...

6. ...oni trovu manieron por ĉerpi monon el la poŝoj de ne-Esperantistoj, kio nun ne sufiĉe okazas. Per studo kiu klare indikas la specon de eldonoj kiuj estas nepre monnaskaj (certe lernolibroj, vortaroj, ktp...)

7. ...La VERDA KONTO vere funkciu, eble per publikigo de listo de apogantoj, eble per postulo de minimuma sumo al estraranoj, grupgvidantoj, ktp kiu ilin instigus al pli serioza kontrolo de la uzado...

8. ...Kursoj sukcesu postuli 5.000 frankojn da enskribmono kaj ankoraŭ pli da subvencioj estu akiritaj...

9. ...Verŝajne la kvanto da laboremaj kaj kapablaj homoj inter nia membraro estas nur iom pli ol en la normala socio, sed multaj bezonas gvidadon kaj kontroladon, kaj do ankaŭ necesas aperi en raportoj ne nur la taskoj sed ankaŭ la respondeculoj. Do, la kvanto da ili ne estas facile altigebla, sed jes la kvalito i.a. per uzado de la internacia lingvo almenaŭ inter ni (foiroj kaj revuoj)...

10. ...gvidantoj kaj kontrolantoj daŭre instigu kaj inspiru individuajn, individuecajn aktivulojn. Helpon moralan ili bezonas, por ke ili ne plendu pri sia soleco. Ĉar serioza laboro plej ofte estas farita de individuo kaj ne de grupo. Unu respondeculo por tasko aŭ projekto, sed kun kunlaboro de grupo...

11. ...Perestrojkon ni bezonas kaj gvidadon por ekz. instigi la junulojn...

12. ...En 1996 ni havu centon da bonaj grupoj kiuj bonege kunlaboras...

13. ...Veraj esperantistoj estas pli gravaj ol simpatiantoj...

14. ...Bonaj ideoj aperu kaj estu realigitaj, denove per instigo kaj apogo de estraro...

15. ...Distingi inter revuoj kaj rekalkuli por ili kiuj eblas per reuzpapero kaj kiuj ne...

16. ...En 1996 raportoj kaj protokoloj estos kompletaj kaj enhavos nomojn, taskojn de respondeculoj, montros la kuraĝon de la estraranoj kaj plene malkaŝos ĉiujn sekretojn...

17. ...En 1996 ni sekvis kvinjaran strategian planon kaj tiu plejparte realiĝis, ni atakos baldaŭ novan, ni laŭdas la respondeculojn kiuj plenumis kion ili promesis kaj donos duan ŝancon al la aliaj...

**L. En la imago de G. Maertens vi trovos:**

1. ...la valoro de kluba agado kaj vivado ne plu estas la sola aŭ plej granda bazo por la ligo; la individua membreco sen rilatoj al iu klubo pli kaj pli kutimas...

2. ...pro tio, nur parto de la kotizo transpagiĝus al la klubo...

3. ...pro tio postulu pli da atento al tiuj izolaj membroj...

4. ...la kotizo estas ridinde malalta kaj devas esti adaptita la la indico...

5. ...serioza informado pri la donac-politiko, ĉar multaj gemembroj subtenas asociojn kiuj 1) transdonas la malpacon anstataŭ homaj rajtoj pro la altrudita angla lingvo kaj 2) duoble ricevas nome pere de impostoj kaj rekte; al la almoza subvencio de nia asocio devus esti aldonita tiujn donacojn...

6. ...FEL devus starigi fondaĵojn por konkretaj projektoj, aĉetoj aŭ kampanjoj (ekz. nova maŝino, ktp)

7. ...trarompo de kliŝoj: ju pli forta estos la angla, despli da aŭskultantoj por Esperanto; substreko de la prepodeŭtika valoro de Esperanto, ktp...

8. ...starigo de laborgrupo por proponi al firmaoj traduki teknikajn tekstojn, salutkartojn, ktp kantraŭ pago...

9. ...daŭrigo de la klopodoj en la normalajn kanalojn de librodisvendado...



10. ...eŭropa agado havas prioritaton pro pli granda ebleco je sukceso...

11. ...kontakti alternativajn grupojn por informi, konvinki, sed ankaŭ por mono.

**N. Kaj fine la imago de I. Durwael:**

1. ...apud FEL oni fondos akcian asocion por la profitigaj aktivecoj (revuoj, novaĵagentejo, grafikaj laboroj)...

2. ...estas esperantistoj kiuj profesie peradas muotajn mendojn de flandraj entreprenoj uzante lokajn deligitojn por ne-oficialaj informoj, tradukante, ktp...

3. ...emerituloj kaj kelkmonataj eksterlandaj volontuloj helpas kaj estas ankaŭ porstudenta laborstaĝo (ili povas pergajni partoprenkotizon al FLEJA-smajnfino)...

4. ...per sistemaj kampanjoj la abonantaro de Monato kreskis ĝis 4.000 kaj oni multe kunlaboras kun orient-eŭropo (Esperantotur transportas,ktp)...

5. ...ni kunlaboras kun multaj organizoj; ni informas Amnestio internacia pri lingvaj kaj aliaj diskriminacioj, ni peras lingve por Ruĝa Kruco, Kuracistoj sen Limoj, ni helpas integriĝon de fremduloj kaj tiel ekhavas multe da populareco por Esperanto ĉe la junaj intelektuloj...

6. ...niaj kampanjoj havas tiom da sukceso ke ni apenaŭ sukcesas respondi la informpetojn en la centro kaj iom post iom formiĝas lokaj profesiecaj centroj...

7. ...organizo de kursoj estas nun la ĉefa aktiveco de la lokaj grupoj kaj kursoj multas pro la aktiva interŝanĝo kun lernejoj; fondiĝis gepatraj rondoj kiuj organizas vojaĝojn; la tradiciajn klubojn nun precipe vizitas pli juna iom alternativa publiko...

8. ...oni organizos serio da lingvokursoj de malpli konataj lingvoj (pola, hungara, kataluna, ktp)...

9. ...la antverpena domo fariĝis renkontiĝejo por eksterlandanoj; origine oni nur invitis la amikecrondon de la lando el kiu venas la esperantisto kiu prelegos, kaj pli kaj pli tiu novaĵo disiĝis tra granda ĉirkaŭaĵo de Antverpeno...

10. La rolo de la estraro ŝajnas al mi atenti pri la deziroj de la ne-

esperantista publiko kaj de la lokaj grupoj; la oficistaro konvinkiĝu ke ili ne nur faras rutinan salajritan laboron, ilia kompleksa tasko estas ja serva, sed samtempe esti atentema pro financa bonfarto; aktivuloj atentu pri la deziroj de ne-esperantista publiko, ĉar klubo nur havas sencon se ĝi ekzistas por kontentigi dezirojn de difinita grupo...

11. ...ĝenerala malfermeco kaj kunlaboro inter esperantist(ar)oj kaj kun ne-esperantistoj ege gravas, sed pro tio ni samtempe devas havi pli da memfido kaj memkonvinkiĝon...